

LA PACDEFENDANTO

N-o. 22. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO NOV. 1953.

Kio ne estas perfekte ruĝa, estas nigra.

Sinceran miron vekis ĉe mi via sciigo pri perdo de sendaĵo da bultenoj de la „Aŭstria Pacrondo Esperantista". Se iam kaj tiam ne alvenas „Heroldo", tio estas finfine komprenebla, ĉar ĉe kelkaj niaj „ortodoksaj marksistoj" ĉio, kio ne estas perfekte ruĝa, estas nigra (pardonu mian sincerecon) sed, se povas ankaŭ perdiĝi revuo, batalanta por la plej alta celo de la homaro, la sopirata tutmonda paco kaj perfekta harmonio inter la popoloj, tio iom suspekte malodoras. Vole nevole ekestas demando, ĉu niaj oficialuloj sincere klopodas starigi la pacon per ĉiuj disponeblaj rimedoj, do ankaŭ per la helpo de Esperanto, aŭ ĉu ili sekvas siajn flankajn interesojn?

Ĉu ili neniam komprenos, ke ilia miopa sinteno al Esperanto vekas suspekton ĝuste ĉe tiuj, por kiuj ĉiu nia agado devus esti ekzemplo, nome ĉe la laboristoj en kapitalistaj landoj? Ni esperantistoj ja ĉiutage spertas, ke la kapitalistlandaj laboristoj rigardas Esperanton kiel efikan batalilon por la celoj de la tutmonda proletaro. Ne estas do mirinde, ke ili ne komprenas, kial ĝuste la landoj, en kiuj la socialismaj revoj fariĝas realo, tute senmotive tiun ĉi batalilon forĵetas.

En unu artikolo pri la antaŭ ne lenge okazinta mondfestivalo en Bukaresto raportisto priskribis inter alie, kiel diverslandaj partoprenintoj perfekte interkompreniĝis per gestoj kaj alridetoj !!!

Nu tio estas, modere dirite, iom primitiva formo de interkompreniĝo en la DUDEKA JARCENTO. Unuflanke ni klopodas kiam eble perfektigi kaj pli modernigi ĉiaspecajn produktrimedojn kaj aliflanke ni kontentiĝas pri neperfekta interkompreniĝis per gestoj kaj alridetoj. Miaopinie la homa lingvo estas la plej grava donaco, per kiu la naturo dotis nin. Sen ĝi, nenia progreso, nenia tekniko, nenia scienco estus imagebla. Sen ĝi ni sendube restus sur la sama nivelo kiel la bestaro. Kaj ni, kiuj plenforte penas transformi la naturon kaj junigi ĝin por nia bono, devas kunplekti la manojn, kiam antaŭ ni ekstaras la lingva problemo kaj senage atendi ĝis IAM EN NEBULA ESTONTO LA PROBLEMO PER SI MEM, "NATURE", ARANĜIĜOS. Ĉu tio estas prutenta? Ni esp-istoj konas la vojon irendan, kaj ne lasas nin forlogi disde tiu vojo, kiaj ajn estu la ĉikanoj de niaj malamikoj!

La esp-istoj ne fariĝis pacbatalantoj "je kvin minutoj antaŭ la dekdue", por ni la batalo por la paco ne estas ia modaĵo. La ideo de la paco kaj perfekta harmonio inter la popoloj staris jam ĉe la lulilo de nia lingvo, ja ĝi estis la propra instigilo, kiu plene okupis la cerbon kaj koron de la aŭtoro de Esperanto. Ĉu ni nun forĵetu tiun ĉi bone elprovitajn kaj efikan ilon nur pro tio, ke ĝi al iu ne plaĉas? Estus vera krimo, se ni neglektus eĉ la plej etan rimedon, kiu povus iel ajn kontribui al la starigo de la mondpaco. Se ni estas konvinkitaj, ke Esperanto estas tia rimedo, ni plene rajtas, ja ni devas uzi ĝin! Kaj ĉar oni malhelpis al ni renkontiĝi kun samopiniantaj pac-batalantoj eksterlandaj en St. Pölten, ni klopodu aranĝi tian Renkontiĝon en Ĉeĥoslovakio. Tiam niaj oficialaj organoj ne povos uzi elprovitajn pretekston pri la valut-ekonomio kaj ili devos, vole nevole, cedi. Aŭ ĉu ili kuraĝos per malpermeso de tia renkontiĝo elveki nian dubon pri ilia sincereco koncerne la pacdefendon?

Alois ZMEŠKAL-Praha

EKSTRAKTO EL LETERO EL D.D.R.

... Iam ankaŭ niaj kaj viaj gvidantoj ekkonos la gravecon de nia afero. Vidu Portugalion, kie oni malpermesis Esperanton kaj nun oni ree permesas ĝin. Mi mem ĉiam pripensas ĉu denove skribi al la Centra komitato de SED aŭ ĉu atendi ĝis la unuiĝo de nia lando efektiviĝos. Tiam ni povos

tutcerte ree labori. Tion eĉ la partio konfesis al ni.

Nia konstitucio diras, ke la civitanoj povas kuniĝi en societoj kaj kluboj, se ties celoj ne estas kontraŭŝtataj. Tamen ekzistas policia ordono, kiu malpermesas unuiĝon de artefarita lingvo. (ĉu artefarita lingvo estas kontraŭŝtata?? – rimarko de red.)

Mi nun jam skribis al nia prokuratoro kaj petis, ke li zorgu, ke nian konstitucion ankaŭ respektu la policio. Ni vidu, kion li respondos.

Tiu nepermeso de grupoj treege al ni malhelpas. Kaj tamen, malnovaj pioniroj daŭre propagandas same kiel mi. Grave al tio helpas leteroj el eksterlando, kiujn ni ricevadas el ĉiuj mondpartoj. Ili tiom efikis, ke laboristoj mem postulis de mi aranĝi kurson, volante nepre lerni Esperanton.

En la urbo PIRNA estas malnova instruisto, kiu min vizitis antaŭ ne longe kaj diris, ke tie estas 20 junuloj, kiujn li instruadis kaj kiuj jam vigle korespondadas kun eksterlando.

Pri St. Pölten; mi dubas ĉu iu estis el nia lando tie, ĉar pasporton ricevas nun nur komercaj personoj, sed ne privatuloj.

W. Ranft, Radebeul

INTERNACIA RUSA LINGVO

Okaze de solena malfermo de ruslingva altlernejo en Praha (ĈSR) publikis la centra organo de la Ĉsl. koinunista partio "Rudé Právo" la 5. de oktobro jenan citaĵon el parolado de nia mortinta prezidante Klement Gottwald: „Diversaj lingvoj jam ludis en la historio la rolon de internacia interpretisto. Estis internaciaj lingvoj de kapitalista komerco, de eklezio en la servo de subpremanoj, de burĝa diplomacio ktp. Nune temas pri aperaĵo historie tute nova. La rusa lingvo fariĝis internacia lingvo de la progreso, de la batalo por nacia kaj socia liberigo, lingvo de la batalo por la paco.

Do ne internacia lingvo de kosmopolitikaj komercistaĉoj, diplomatoj kaj ekspluatantoj; sed lingvo internacia propra de la popolaj amasoj, kiujn ĝi kontaktigas en ilia batalo reciproke kaj precipe kun ilia plej granda amiko helpanto kaj ekzemplo, la sovjeta popolo. Kaj certe speciale ni, dum la konstruado de socialismo konsciiĝas, kian helpilon ni havas en la rusa lingvo, kiu al ni donas la eblecon ĉerpi rekte el la fonto de la sovjeta scienco kaj kulturo, kaj interkomprenigi rekte kun niaj amikoj kaj konsilantoj."

El la duonpaĝa artikolo, kiu argumentas kaj rekomendas la valoron de la rusa lingvo ni citis la parton, kiu plej povas interesi niajn legantojn, kaj kiu certe ankaŭ klarigas la demandon; kial "Esperanto estas en nia lando nedezirata". Restas al ni atendi la rezultojn kaj sukcesojn de tiuj ĉi ĉiuflankaj klopodoj. Fakte tamen estas, ke la rusa nek iu alia nacilingvo iam sukcesos konkure forigi Esperanton.

R. Burda

P E R S I S T A S I L E N T O

Siatempe, antaŭ monatoj post kalumnia kontraŭ-esperanta artikolo en la revuo por uzinaj kluboj, "KLUB" multaj diskut- kaj protestleteroj atingis la redakcion kaj la skribinbon, profesoron Trávníček kun la postulo, ke ankaŭ

(bedaŭrinde plua teksto ne konserviĝis aŭ ne estis trovita)